

& Ŝi estas gaja:

< Rekante 23 el 53 batoj aŭ 29 el 59 por strofo, entute 583 paŝoj dum 6 aŭ 641 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo. Alternative uzeblas tiuj de Dektria numero.>

(#Melodio:

(<1,5:43> mi /mi mimi mi mimi re doTi La La;Ti do dodo re dore mi mi; mi mi mimi mi mimi re doTi La La;Ti do dodo Ti doTi La La;

(#Rekantaĵe: mimi mi re doTi La a;Ti dodo re re mi mi; mimi mi rere doTi La; LaLa LaTi dodo TiTi La La a))

?

(<:59> /mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi; mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi;

(#Rekantaĵe: mimi rere do dodo dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi; mimi rere do do dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi i))

)×11)+

(&Strofoj:

'1 Ŝi /estas ankoraŭ malgranda infano, ; Ŝin ĉiuj dorlotas kaj amas; En ŝia vizaĝo, floranta per sano ; Gajeco senzorga nur flamas.

(×: **Mian manon tenu nun ; en firma ligo kune ; kaj neniam rompiĝu ĝi ; eĉ se dure frapas nin fortune.**)

?

(×: **Vidu, suno levas nun sin por nova tago ; kaj ne zorgas niajn agojn ; kaj ĝi superpasos nin ĝis la vespero ; dum klopodas ni sur tero.**)

'2 Jen jaroj forpasas. Ŝi lukse disfloras, ; Ŝin sorto renkontas afable; Ŝi estas tre gaja, neniam ŝi ploras, ; Kaj vivon pasigas agrable.

'3 Rigardu: jen rajdas en cirka areno ; Konata al vi belulino, - ; Ŝi saltas, ŝi dancas sen deva konveno, ; Ĉar estas ŝi gaja fraŭlino!

'4 Kaj ĉiuj laŭtege kriante ŝin laŭdas, ; Je ŝia talio admiras, ; Ŝin multe elvokas, senfine aplaŭdas, ; Al ŝi ornamejon eniras.

'5 Jen domo gajega. En ĝia salono ; Belegaj virinoj promenas, ; En tiun-ĉi domon pro vino kaj mono ; Tre multaj fraŭlinoj alvenas.

'6 Jen vidu: ekfalas sur molan kanapon, ; En brakoj de iu sinjoro, ; Belega fraŭlino. Jen levas ŝi kapon ; Kaj ridas en bona humoro.

'7 Ĉu vi ŝin ekkonis? Tre gaja fraŭlino! ; Pasie ŝin kisas sinjoro, ; Karesas kaj donas pokalon da vino, - ; Ŝi trinkas kaj... ridas el koro!

'8 Post tio forflugas apenaŭ nur jaro, ; Kaj ŝin mi denove ekvidis, - ; sed kie? Sur kota drinkeja ŝtuparo ; Ĝi staris malsobra kaj ridis.

'9 Foriĝis jam ŝia beleco vizaĝa, ; Nenio antaŭa jam restis. ; Ŝi min ekrigardis kun vido malsaĝa ; Kaj kvazaŭ kontenta ŝi estis.

'10 "Vi eble per brando regali min volas?" ; Demandis ŝi min arogante: ; "Ĉar vidu... hodiaŭ... mi... iom petolas!" ; Kaj ŝi ŝanceliĝis ridante.

'11 Kaj ĉiam ridanta, kaj ĉiam kontenta, ; Vivanta pro mono kaj vino, ; Senzorga, senhonta, sensaĝa, sensenta, - ; Jen vivo de gaja virino!)